

Enhavo

- **anoncoj**

Grava kemia lernolibro ĝisdatigota; New in the E-USA bookstore

- **Ĉiam preta respondi interesajn demandojn!**

de la prezidanto - Orlando E. Raola

Entreprenistoj inventis la esprimon "lifta parolado" por priskribi "mallongan, zorgeme planitan, kaj bone provluditan priskribon de via kompanio, kiun via panjo povos kompreni dum la tempo bezonata por atingi la plej supran etaĝon lifte."

- **De kie venas la nomo Usono?**

demandu al Usona Esperantisto - Lee Miller

Ĝi estas frua vorto: jam en 1908 ĝi estis en la *English-Esperanto Dictionary* de Joseph RHODES, kaj Zamenhof mem uzis ĝin en la Kongresa Parolado en Vaŝingtono, 1910. Foje oni aŭdas ke ĝi estis vorto uzata de Frank Lloyd WRIGHT, la usona arkitekto, sed lia stilo *Usonian* aperis multe pli malfrue.

- **Lumineska akvo en Alabamo**

vojaĝe tra Usono - Johano Bentley

Pro impulso, mi trempis la pinton de mia fiŝkano en la akvon kaj ĉirkaŭmovis ĝin. La pinto tuj flamis verde. Kio povus klarigi tian fenomenon?

- **"Nevados"**

senintenca esperantaĵo?

Ĉu ili grimpos? Jes, ja. Ĉu marŝos? Kompreneble. Sed ĉu vados? Nu... bedaŭrinde, ne. Ŝajne tiuj ĉi botoj ne estas akvoimunaj.

- **"Mirado"**

senintenca esperantaĵo? - Julie Spickler

Membro Julie SPICKLER atentigis nin pri kraĵoj tiel eksterordinaraj, ke ties uzantojn trafas... mirado!

ISSN: 1056-0297

Usona Esperantisto
Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2013:6 (nov-dec)

American Esperantist
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2013:6 (nov-dec)



Ĉi-numere:

- *De la prezidanto:* Ĉiam preta respondi
- *Vojaĝe tra Usono:* Lumineska akvo en Alabamo
- *Demandu al UE:* De kie venas la nomo Usono?

Ĉu vi estos preta fari lifto-paroladon kiam oni demandas pri Esperanto?


Grava kemia lernolibro ĝisdatigota

Eldongrupo *Cengage Learning*, unu el la plej gravaj produktantoj de lernolibroj tutmonde, konsentis la aperigon de traduko de la sesa eldono de *Ĝenerala, Organika kaj Biologia Kemio* [<http://goo.gl/zLoYL3>] de H.

Stephen STOKER. La libron eldonos Esperanto-USA sub la traduka kaj eldona kontrolo de Orlando RAOLA, prezidanto de la asocio kaj profesoro pri kemio ĉe Santa Rosa Junior College en Kalifornio.

Pli frua eldono de tiu ĉi verkego aperis en limigita kvanto en la okdekaj jaroj, publikigita de la Esperanto-Societo de Ĉikago, sub prizorgo de Doug PORTMANN kaj Kent JONES. Multaj esperantistoj-kemiistoj tra la mondo partoprenis tiun projekton. La nuna eldono estas kompreneble bazita sur la unua, sed estos profesie kompostita kaj presita, enhavos la samajn altkvalitajn grafikaĵojn de la anglalingva originalo, kaj plej grave, respegulos la nuntempajn evoluojn de kemiaj sciencoj, do estos ĝisfunde ĝisdatigita.

La eldonisto O. Raola petas al ĉiuj kiuj kunlaboris en



la malnova eldono montri sian pretecon kunlabori ankaŭ ĉi-foje. Bonvolu kontakti lin ĉe <kemia_libro@kulturo.net>. La nova luksa versio de la lernolibro espereble estos lanĉita kadre de la 100-a UK en Lille en la nord-duonsfera somero de 2015.


Jen la malnova afero, kiu ricevos tute freŝan vivon!
— Orlando RAOLA, <kemia_libro@kulturo.net>

New in the E-USA bookstore

ESPERANTO AS A STARTER LANGUAGE

Angela TELLIER, Ed.

This book summarizes the experiences and results of the experiment to implement *Springboard to Languages* in primary schools in Britain. Includes theoretical foundations and excerpts from the project materials. 2013. 75 p. Softcover. Britain. **\$21.71**



Purchase from *Esperanto-USA*, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530, or online [<http://goo.gl/osh4OJ>].

Ĉiam preta respondi interesajn demandojn!

Orlando E. RAOLA

Usonaj entreprenistoj kaj manaĝeraj sciencistoj (iuj pridubas tiun ĉi lastan oksimoron) inventis la esprimon “lifta parolado” por priskribi “mallongan, zorgeme planitan, kaj bone provluditan priskribon de via kompanio, kiun via panjo povos kompreni dum la tempo bezonata por atingi la plej supran etaĝon lifte”.

Miasperte, plejparto el ni, esperantistoj, havas aŭ certas ke ili havas (eĉ se ili vere malhavas) taŭgan “liftan paroladon”. Ili pli-malpli certas, ke tute ne estas problemo priskribi la historion de Esperanto, ĝian nuntempan situacion, paroli pri la fundamento de la Esperanta gramatiko kaj vortfarado, kaj entute pri la enormaj avantaĝoj kiujn disponas la homaro se oni tutmonde kundecidus adopti Esperanton.

Nu, almenaŭ mi tiel opiniis pri mi mem ĝis antaŭnelonge, kiam vivcirkonstancoj atentigis min pri la graveco esti bone preparita por neatendita intervjuo, por improvizita prelego pri Esperanta lingvo, literaturo, historio, movado, ktp.


Jen la okazintaĵo: mia dudek-ses-jara filo invitis nin konatiĝi kun la familio de lia fianĉino. Tiucele ni ĉiuj kunveturis al Taos, Nov-Meksiko, hejmurbo de la juna ĉarmulino. La vizito estis ege agrabla, ŝiaj gepatroj kaj frato montriĝis gastamaj, komunikigemaj kaj alte edukitaj personoj, kiuj sufiĉe multe vojaĝis tra la mondo. Mi volontulis kuiri por ili tradician antaŭkristnaskan kuban manĝaĵon, kaj tiel estiĝis festeno. Ĉiuj manĝis abunde, laŭdis la insulan kuirarton (ĉu mi malmodeste aldonu la artiston?) kaj post deserto kaj kafo, vigla konversacio pli plej diversaj temoj okazis ĉe la tablo, ĝis subite la estonta bopatrino de mia filo demandis: “Ĉu vi povas iomete klarigi pri tiu afero de Esperanto? Mi aŭdis, ke temas pri lingvo, sed mi scias nenion pli.”

Malgraŭ tio, ke temas eble pri ofta kaj relative ordinara sperto, almenaŭ por tiuj el ni, kiuj de pli ol

du jardekoj esperantumas, mi ĉiam tremetas/timetas, kiam mi ricevas tiun demandon rekte. Venas tuj en mian kapon plej diversaj aferoj kiuj sin interpuŝas kaj senkomplete postulas plenan atenton: atenti ne diri tro multe, paroli nur mallonge kaj dum oni aŭskultas vin atente; estu entuziasma sed tute ne impresu zelote fervora; ĉu limigi la paroladon nur al la nunaj atingoj aŭ ĉu atentigi pri 130-jara historio; kaj kiel respondi la insidan demandon: sed ekzakte kiom da parolantoj?

Mi kalme ekparolis (plej malfacile estas ekpaŝi). La unua minuto, la “lifta parolado” estas la plej danĝera parto, ĉar la aŭskultado kaj sukceso de la cetero ĉiam dependas de la taŭgeco kaj kvalito de tiu unua minuto. Verŝajne mi sukcesis, ĉar miaj kunmanĝintoj faris plurajn demandojn, kiuj variis de la nuna situacio kaj disvastigo, tuŝis la kialojn labori por disvastigo de Esperanto ĝis la peto ke mi priskribu tute detale, kiel mi malkovris la lingvon kaj fariĝis esperantisto.

Karaj legantoj: Alvenas la fino de nova jaro kaj de nova jarkolekto de *UE*. Kune kun jarŝanĝiĝaj bondeziroj mi sendas al vi mian proponon pripensi kaj praktiki ĝis perfekteco vian “liftan paroladon”. Memoru, ke unu grava celo de nia movado ĉiam estis kaj restos, ke ĉiu minimume edukita homo sciui almenaŭ la bazajn faktojn pri nia mirinda kaj reviga projekto. Projekto por ŝanĝi la mondon al iu pli bona stato, ĉu ne?



Orlando E. RAOLA

Orlando estas prezidanto de Esperanto-USA. Li loĝas en Greenbrae, Kalifornio.

<oraola@gmail.com>

De kie venas la nomo *Usono*?

Lee MILLER

En ĉi tiu rubriko ni aperigas respondojn al viaj demandoj pri lingvo, gramatiko, kulturo, literaturo, historio, kaj iu ajn rilate Esperanton. Se vi havas demandon, nepre sendu ĝin al ni!

Pri la nomo *Usono* estas iom da mistero rilate al ties etimologio kaj ekapero en Esperanto. Ĝi estas frua vorto: jam en 1908 ĝi estis en la *English-Esperanto Dictionary* de Joseph RHODES, kaj Zamenhof mem uzis ĝin en la Kongresa Parolado en Vaŝingtono, 1910. Foje oni aŭdas ke ĝi estis vorto uzata de Frank Lloyd WRIGHT, la usona arkitekto, sed lia stilo *Usonian* aperis multe pli malfrue. Foje homoj supozas ke ĝi estis iom misformita el “Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko” (kun *S* anstataŭ *Ŝ*), aŭ ke ĝi venis de anglalingva akronimo de “United States Of North America”, kun *A* → *O* por substantiva formo.



Oni eĉ vendas t-ĉemizojn kun la usona flago [<http://zazzle.com/esperantoland>] por esperantistoj.

Don HARLOW en aŝiŝo en la retejo de E-USA (18 Januaro 2007) skribis:

The name *Usono* was proposed in around 1904

by the French Esperantist Gaston Moch. He, however, apparently borrowed the name from the English-language press, which sometime in the late 19th century coined the term *Usonia* or maybe *Usona* (an acronym for “United States Of North America”) as shorthand for the United States. The latest use of the term in Anglalingvio was, as far as I know, when Frank Lloyd Wright developed his *Usonian House*; although once, when I was driving down Highway 49 in California on my way to a job interview in beautiful downtown Coarsegold, I crossed a crossroad with the interesting name *Usona Road*.

Sekve de tio, mi esploris kaj trovis la dokumenton en kiu aperis tiu ĉi propono. Danke al la grandioza Google-projekto pri skanado kaj enretigo de historiaj dokumentoj, eblis trovi ĝin per serĉado de *Moch + Usono*. Manke de alia informo, mi supozas ke tiu ĉi ja estas la enkonduka punkto de la vorto *Usono* en Esperanto.

La dokumento nomiĝas (dulingve) *Histoire Sommaire de l'Arbitrage Permanent/Historio Resuma de l'Arbitracio Konstanta*, eldonita de *Instituto Internacia de la Paco* en Monako, 1905. Jen la citaĵo el tiu ĉi fonto (p. 48):

Usono, Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko. – Strange estas, ke ekzistas nenia nomo por la regnaroj de Unuigitaj Ŝtatoj kaj por ilia nacio. Oni nomas ilin, ĝenerale, Amerikanojn; sed tiu nomo estas evidente malpreciza.

De kelkaj jaroj, oni komencas, en Unuigitaj Ŝtatoj, nomi la landon per la nomo *Usona*, kunmetita per la ĉefliteroj de la vortoj *United States of North America* (t.e. Unuigitaj Ŝtatoj de Norda Ameriko); tio, kio koncernas la landon, estas *usonian*, kaj, simile, la regnaro estas nomata *Usonian*. Tiuj nomoj, tre oportunaj kaj

bonsonaj, ŝajnas esti disvastigontaj, kaj oficiale akceptotaj.

En Esperanto mi proponas nomi la landon **Usono**; la responda adjektivo estus **usona**, kaj la regnano **Usonano**.

Eble oni povus diri *Usonujo* aŭ *Usonlando* por la regno, kaj *Usono* por la regnano. Sed la ĉi superaj vortoj ŝajnas al mi preferindaj.

Mi zorge transskribis kaj kontrolis la citaĵon. Moch ja skribis “oni nomas ilin ... Amerikanojn” (devus

esti “oni nomas ilin ... Amerikanoj”). Mi rimarkis ke ofte en aliaj lokoj de la teksto li uzis la vorton “etato” anstataŭ “stato”. Bona ekzemplo de frua lingvaĵo.


Cetere estas sufiĉe amuze el nia fora perspektivo, ke li taksis la nomojn *Usona* kaj *Usonian* “disvastigontaj” kaj “akceptotaj”. S-ro Moch estis bona Esperantisto, sed ŝajne malbona profeto!

Pri alia termino, Moch indikas en piednoto por la teksto ke: “Same, la konata moknomo *Uncle Sam* (Onklo Sam) devenas de la oficiala mallongigo U.S. Am.” Pri tio mi ne havas komenton.

senintenca esperantaĵo?

“Mirado”

Julie SPICKLER



Membro Julie SPICKLER atentigis nin pri kraĵonoj tiel eksterordinaraj, ke ties uzantojn trafas... mirado! Ĉu Esperantaj nomoj estas nova modo por skribilo-markoj? Pasintnumere aperis globkraĵono *signo* kaj nun grafita kraĵono *mirado*. Ĉu sekvos paŝtelo? Skrapgumo?

Lumineska akvo en Alabamo

Johano BENTLEY

Mi skribis antaŭe pri Mobile, Alabamo – kaj la fakto, ke multaj aferoj, kiuj okazas ĉi tie, ne okazas aliloke. Jen rakonto pri alia el tiaj.



Loko de la urbo Mobile en Alabamo, Usono

En 2006, la jaro post uragano Katrina, mi kaj mia edzino sidis ĉe la fino de nia ankoraŭ rekonstruata varfo. Post ĉiu uragano ni mem rekonstruas nian varfon, kaj estas nia kutimo sidiĝi ĉiun nokton sur la fino de la tiutage rekonstruita peco kaj tosti nian sukceson per kelkaj ĝlasoj de ĉampano, sen infanoj aŭ aliaj distraĵoj. Ni foje fiŝkaptas, aŭ sidas kaj interparolas, aŭ nur kviete ĝuas la kuneston unu de la alia.

Tiun ĉi nokton, ĝuante la malstreĉigan sonon de akvo kviete plaŭdanta kontraŭ la varfostoj, mi rimarkis ke la lunlumo sur la akvo estis aparte brila. Nia ĉegolfa domo estas for de urboj, do noktoj ĉe ni estas kutime tre mallumaj. Tamen tiun ĉi nokton, kiam ondoj rompiĝis kontraŭ la varfostoj, mi povis vidi ĉiun guteron de akvo. Samtempe mi rimarkis ke la luno estas nur eta arko en ĉielo, do ne sufiĉe luma por klarigi la brilecon.

Mi malatente serĉis fonton de la lumo, sed ne trovis ion ajn aparte brilan, kiu povus klarigi la verdan lumon briletantan sub niaj piedoj. Kio okazis? Ŝajnis, ke la akvo mem ardas! Minuton post minuto, la verda ardo pli kaj pli brilis, sed nur ĉe la akvo moviĝanta. Baldaŭ la kresto de ĉiu ondeto flamis per

verda inkandesko! Pro impulso, mi trempis la pinton de mia fiŝkano en la akvon kaj ĉirkaŭmovis ĝin. La pinto tuj flamis verde. Kio povus klarigi tian fenomenon?

Mi kaj mia edzino ĝuis la spektaklon dum longa tempo. Fine ni restariĝis kaj promenis reen laŭ la varfo al la bordo. Laŭvoje ni rimarkis, ke la naĝantaj fiŝoj flamas, kun vostoj brilantaj kiel kometoj en ĉielo. Tutaj gregoj de fiŝoj rapidis sub niaj piedoj kiel ondoj de verda flamo. Ĝi estis la plej mirinda afero, kiun mi iam vidis, kaj mi loĝis apud la golfo de Mobile preskaŭ mian tutan vivon. Nia 300-futa promeno laŭ la varfo daŭris unu horon.



Mikroboj *Noctiluca scintillans* ĉe marbordo en Aŭstralio. Kiam perturbitaj, ili eligas lumon. Foto de Phil HART [http://philhart.com/gallery/Astrophotography/Phenomena].

La venontan tagon mi demandis pri la afero al sciencistoj ĉe la marlaboratorio *Dauphin Island Sea Lab*. Ili diris, ke mi observis maloftegan superkreskon de biolumineskaj mikroboj. Neniu scias, kial subite – kaj malofte – ili komencas ardi

kiam perturbitaj. Oni diras ke tia evento okazas nur unu fojon en homa vivodaŭro, kaj tiu, kiu vidas ĝin, estas benita.

Mi havas kortuŝan kaj malgajan memoron pri la afero. Pro la malfrua horo (la unua aŭ dua matene) mi ne vekis miajn infanojn por ke ili povu vidi la aferon. Mi ĉiam bedaŭros tiun decidon, ĉar estas tre malverŝajne ke la fenomeno denove okazos dum iliaj vivoj. Mi povas nur esperi, ke ili iam vidos ion tiel belan kaj miraklan – ion, kio rememorigas ilin, ke ili devus foje malrapidiĝi kaj observi la miraklon de la naturo, kiu ĉirkaŭas ilin.



Johano BENTLEY

Johano loĝas en Mobile, Alabamo. Kiel profesia bestkuracisto, li trovas sin sur la limo inter sovaĝejo kaj civilizacio, inter bestoj kaj ties posedantoj – kiuj foje estas pli sovaĝaj (aparte kiam mono

postuliĝas).

<classicalswordsman@comcast.net>

senintenca esperantaĵo?

“Nevados”

NEVADOS



Ĉu ili grimpos? Jes, ja. Ĉu ili marŝos? Kompreneble. Sed ĉu ili vados? Nu... bedaŭrinde, ne. Ŝajne tiuj ĉi botoj ne estas akvoimunaj.